Min premas forir-dolor'

M: ADE ZUR GUTEN NACHT



2. Mi dankas pro nokt' kaj tag',
pro ĉiu ripoz' kaj ag', / defio, forto,
pro gajo, plezur' kaj ĝoj',
sed ankaŭ pro aspra voj', / pro ĉia sorto.

3. Kunhomoj, mi dankas vin:
Vi helpis, ĉirkaŭis min / per multa bono.
Se mi pretervidis vin,
vin lezis, malfidis vin, / vi min pardonu.

4. Provizis min Di' per sci',
racio kaj emoci', / decid-libero.
Min dotis la Di-Spirit'
per semoj de l' am' kaj fid' / kaj de l' espero.

5. Ŝanĝiĝos esper' kaj fid',
fariĝos plenum' kaj vid' / post lasta horo.
Do foren, forir-dolor'!
Min vokas la Amo sor / al Sia gloro.

MIN PREMAS FORIR-DOLOR' • M (Ade zur guten Nacht): popola, frua 19a jarcento, Germanujo kaj Svislando • E (originale verkita kiel kontrafakturo): Albrecht Kronenberger 2023-02-08